



# Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 4  
1975

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO  
Redaktoro: Hans Amund Rosbach

3-a periodo  
42-a (51-a) jaro  
Dumonata

## La 44-a Norvega Esperanto- Kongreso en Tromsø

Nia landa kongreso ĉi-jare estis unika laŭ pli ol unu vidpunkto: ĝi okazis apud la Arktika Maro, en la lando de la noktomeza suno (sed la sunon ni ne multe vidis, kaj bedaŭrinde precipe ne dum la noktoj); aliĝis pli multaj eksterlandanoj (64) ol norvegoj (44), el 13 landoj: Danujo, Francujo, Germanujo, Finnlando, Hispanujo, Italujo, Nederlando, Polujo, Svedujo, Svisujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Usono, sed la reprezentantoj el la 3 lastaj landoj ne alvenis. Ni sekve pasigis kongres-tempo en tute internacia atmosfero. Plej multnombraj estis, kompreneble, svedoj kaj finnoj. Aparte ĝojiga estis la ĉesto de d-ro W. Bormann el Hamburgo, vicprezidanto kaj estrarano de U.E.A. pri Landaj Asocioj, kun sia tuta familio.

Tre malegale reprezentiĝis la nor-

vegaj kluboj: 23 membroj (kaj kelkaj nemembroj) el Oslo, kaj po unu el Haugesund, Odda kaj Skien, kaj kompreneble la Tromsø-anoj mem, kaj unu rekta membro, Saxer Ebeltoft el Arendal.

Tre praktika aranĝo estis, ke la plimulto de la kongresanoj loĝis en hotelo Saga, kie okazis ankaŭ preskaŭ ĉiuj kunvenoj.

Vendredon vespere okazis agrabla interkonatiĝa vespero, kiu estis daŭrigata kiel rondveturo en la urbo, sed pro malbona vetero oni ne iris sur la monton per la montlifto. Sabaton matene okazis la malfermo de la kongreso, du laborkunsidoj (pri la laborkunsidoj legu la protokolon aliloke en ĉi tiu numero), kunsido de la Instruista Sekcio de N.E.L., kaj vespere la kongresa festeno aŭ bankedo.

Ce la bankeda tablo Kirsten Ek

funkciis kiel toastestro. Festparoladon faris C. Støp-Bowitz, por la virinoj parolis Otto Prytz, respondis por la viroj s.ino Jenny Heetkamp Sens-tius. Precipe por multaj el la eksterlandanoj aparta travivaĝo estis la tute senalkohola bankedo, kaj la tuta hotelo cetere. Poste oni vigle dancis laŭ muziko de bona kaj senlaca trio. Je noktomezo venis la Ordena Proce-sio de PRO MERITO; Herolv Olsen, Tromsø, kaj Julie Romsdal, Alta, fariĝis novaj Kavaliroj de la 2a grado.

La dimanĉo estis dediĉita al aŭto-busa ekskurso al Lyngenfjord. La tre belan kaj interesan ekskurson favoris bela, grandparte sunbrila ve-tero. Vespere okazis Internacia Ve-spere en la nova restoracio ĉe Syd-spissen. Post bona manĝo sekvis im-provizita programo, al kiu kontribuis la plimulto de la kongresanoj, kaj la tuto fariĝis tre agrabla kaj sukcesa, dank' al lerta gvidado flanke de la ĉiam aktiva prezidanto de la klubo La Norda Lumo en Tromsø, Herolv Olsen.

Lundon, post la tria kaj lasta la-borkunsido kaj oficiala fermo de la kongreso, okazis aŭtobusa ekskurso al Kvaløy, kun lunĉo (bonega, ĵus-kaptita verda gado) en eta fiŝkaptista restoracioto. Vespere la anoj de la postkongresaj ekskursoj komencis si-an ŝipveturadon norden, iuj kun la Norda Kabo kiel celo, aliaj al Sval-bardo. Mi partoprenis la unuan, pri Svalbardo iu alia eventuale raportu.

Antaŭ ĉio la maro montriĝis tre favora. Eĉ la timegata LoppHAVET estis tute trankvila. En Honningsvåg ni havis tempon viziti la ĝermon de samaa (Iapona) liberaera muzeo 4

km ekster la urbeto, por vidi kiel vivas tiu minoritata popolo de nia plej norda landparto. En la urbeto neniuj povis informi pri aŭtobuso al la loko, sed sameoj povis informi precize kie kaj kiam oni povas trovi aŭtobuson returne.

La aŭtobusa veturo de Honnings-våg trans la vere «magra» Magerøy ĝis Norda Kabo estis tute aparta tra-vivaĝo. Sur la plataĵo de la Norda Kabo la vetero estis tre malvarma kaj nuba, sed ĝuste je noktomezo fendeto en la nubkovraĵo montris, ke la suno efektive ne estis subirinta, je la entuziasmo de precipe la sudlandanoj, kaj survoje returne al Honningsvåg subite la suno komplete malkovriĝis. Reveturante al Tromsø ni povis fari mallongan ekskurson piede tra Hammerfest, gvidataj de O. Nicolaisen, kiu naskiĝis tie.

Ankaŭ ĉi tiun ekskurson gvidis la nelacigebla Herolv Olsen, la animo de la tuta kongresaranĝo. Al li, kaj al la aliaj ekskursgvidintoj kaj kun-laborintoj — kiel la veteranoj Rolf Holm, Johan Eilertsen kaj la ceteraj klubanoj en Tromsø, ni ĉiuj direktas niajn elkorajn dankojn pro brila kaj ĉiel plensukcesa aranĝo. Por ni, sud-norvegoj, same kiel por la multaj alilandaj gastoj, la tuto fariĝis neforgebla travivaĝo por la tuta vivo. Ni esperu, ke la klopodojn de niaj Tromsø'aj amikoj rekompencu pli vigla interesiĝo por Esperanto en la regionoj apud la Arktika Maro.

Partopreninto.



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Provizora redaktoro :

Hans Amund Rosbach  
Johan Hammond Rosbach

Adreso de la redakcio :

Nergt. 37 c, 6500 Kristiansund N  
(Limdato por manuskriptoj : la 20.  
en la monato antaŭ la apero.)

Abonprezo : En Norvegujo kaj ekster-  
lando : n. kr. 12,—.

Anonprezoj: 1/1 p. kr. 150, 1/2 p. kr. 75,  
1/4 p. kr. 40, 1/8 p. kr. 20.

Kongresoj kaj laboro

La somero estas kongresa tempo. Nia numero donas klaran indikon pri tio. Tamen ni ne raportas pri ĉiuj kongresoj: La granda skolta aranĝo Nordjamb donis grandajn eblecojn kaj espereble ankaŭ grandajn rezultojn en la rilato inter skoltismo kaj esperantismo. La Skoltestroj kaj skoltoj en tiu eble la unuan fojon aŭdis pri esperanto.

En Saarbrücken okazis la unua renkontiĝo de la «neŭtralaj esperantistoj», t. e. tiuj kiuj proteste forlasis UEA'n post la Hamburga kongreso, en kiu Lapenna perdis sian pozicion. Kaj ankaŭ aliaj kongresoj okazis.

Kaj la kongresanoj hejmenvenas. Nun komencas la laborperiodo, en kiu la ideoj kaj entuziasmo de la kongresa etozo ne forvaporiĝu, sed realiĝu. Ni kredas, ke la ideoj de ĉiu opa kongreso, t. e. de UEA, NEL, KELI, SAT, skoltoj, «neŭtralaj» ktp., devigas nin al serioza pripensado kaj agado. Ni laboru ! red.

La kontorfondaĵo

Pli frue ..... kr. 1122,—  
Harda Danielsen ..... » 100,—  
C.S.B ..... » 20,—  
Alta Esperantoklubb ..... » 5,—  
R. Bugge-Paulsen ..... » 30,—

1277,—

Kampanjo Reisæter 975

Pli frue ..... kr. 900,—  
Erling A. Haugen ..... » 100,—  
Rolf Stenbro Jacobsen .. » 100,—  
C. Støp-Bowitz ..... » 100,—  
Erling Vorland ..... » 100,—

kr. 1300,—

La Propaganda Fondaĵo 1975

Pli frue ..... kr. 319,—  
August Weide ..... » 104,—

kr. 423,—

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj !

Subtenanta membro 1975

John Selbekk

Aldono

al la jarraporto de N.E.L.

Bonvolu aldoni ankoraŭ jenan alinon al la Jarraporto en n.ro 2:

Honora prezidanto. Okaze de lia 80-jara naskiĝtago la 11an de Decembro 1974 la estraro nomis s.ron R. Bugge-Paulsen la unua Honora prezidanto de N.E.L.

## Sciigoj de N.E.L.

*La aŭtuna laboro.* Jam komenciĝis nova laborsezono. La ĉefa tasko de ĉiuj kluboj kaj membroj nun estas starigo de kursoj por krei novajn esperantistojn. Se en via loko neniu esperantisto povas gvidi kurson, oni kolektu la interesigantojn en studrondo, kiu povas lerni per la koresponda kurso. Klopodu ankaŭ igi gazeton aperigi la gazet-an kurson, kiu estas havebla kaj en matricoj kaj por ofset-presado (skribu al N.E.L. pri regularo kaj provleciono).

*Unika ebleco por perfektigo.* Ni montras al nia cirkulero de la 17a de Junio pri ges.roj Philip el Kanado, sendita al ĉiuj kluboj kaj rektaj membroj. Ni rekomendas, precipe al malgrandaj kluboj kaj al rektaj membroj, utiligi tiun unikan ŝancon. Skribu al N.E.L. tuj, se vi iel povos utiligi ilin.

*Novaj prezoj de la korespondaj kursoj.* De la 1-a de Julio la ŝtato subvencias korespondajn kursojn ankaŭ por unuopaj lernantoj. Sekve la prezoj de niaj kursoj *malaltiĝis* (unika afero en nia tempo!). La prezoj estas nun: 1-a parto kr. 76,00, 2-a parto kr. 76,00, ambaŭ partoj kune mendataj kr. 120,00. Por ĉiu ano de studrondo la prezoj estas kr. 54,00, kr. 54,00, kr. 108,00.

*Taskotabelo por kluboj.* — *Oktobro:* La klubo aranĝas kunvenojn por ĉiuj esperantistoj en la loko (ĉiuj, kiuj iam partoprenis kurson), laŭeble oni sendu inviton al ĉiu unuope. La kunveno estu planita kun la celo (re-)membrigi ilin. Ĉirkaŭ la 24a de Oktobro ĉiuj kluboj aranĝas kunvenon dediĉitan al la Tago de U.N.O. — La kasisto sendas al N.E.L. (kaj al la distrikto) kotizojn kaj liston de novaj membroj kaj de eventualaj malfrue pagintaj malnovaj membroj. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

*Raporto de la Liga Estraro pri la 2a jarkvarono.* Okazis tri estrarkunvenoj, kaj oni elsendis du cirkulerojn. Otto Prytz transprenis kiel komisiito pri radio; Vidar Vik eniris la redakeian komitaton de Norvega Esperantisto. Oni decidis komenci 10-kr.-ruladon por la Propaganda Fondaĵo. Oni nomis Otto Prytz kiel salutonton de N.E.L. dum la 60a U.K. en Kopenhago kaj proponis R. Bugge-Paulsen kiel reprezentanton de la Registaro. Kjell Gustavsen kaj Vidar Vik konsentis eniri komisionon pri la Jaro kontraŭ Rasismo. La broŝuro de la italaj socialistoj estas tradukita. Oni finpreparis la 44an Norvegan Esperanto-Kongreson en Tromsø. Oni traktas kun ges.roj Philip el Kanado pri turneo en Norvegujo. Aperis Esperantaj klarigoj de signoj en horaro de la ĉefaj norvegaj fervojlinioj kaj broŝuro en Esperanto pri Hedemarksmuseet kaj Domkirkeodden.

La Liga Estraro.

## PROTOKOLO

pri la ĝenerala kunveno de N.E.L. dum la  
44-a Norvega Esperanto-Kongreso en Tromsø  
la 4.—7. de Julio 1975

### TAGORDO:

1. *Malfermo.* En la nomo de la aranĝanta klubo, «La Norda Lumo», Herolv Olsen bonvensalutis al la 44-a Norvega Esperanto-Kongreso. Li esprimis ĝojon pro la granda intereso pri la aranĝo en eksterlando, kaj pro la multaj eksterlandanoj, kiuj trovis la vojon al Tromsø.

La prezidanto de N.E.L., C. Støp-Bowitz, faris la malferman paroladon. Li laŭdis kaj dankis la kuraĝajn kaj agemajn membrojn de «La Norda Lumo», kiuj tuj estis pretaj, malgraŭ tio, ke ili estas malmultnombraj, aranĝi la kongreson, kaj kiuj dum du jaroj diligente laboris, kaj atingis la rimarkeblan rezulton, ke la plimulto de la partoprenantoj estas eksterlandanoj, malgraŭ tio, ke sufiĉe multaj norvegoj trovis la vojon al Tromsø. Li laŭtlegis salutleteron de la prez. de U.E.A., d-ro Humhrey Tonkin.

Sekvis la salutoj de la eksterlandanoj: Povl Jørgensen (Danujo), Petro Lorenzin (Francujo), Irja Klemola (Finnlando), Elsbeth Bormann (Germanujo Fed. Resp.), José Franco (Hispanujo), Anĝelo Lovati (Italujo), Jenny Heetkamp Sensius (Nederlandujo), Irena Szanser (Polujo), Gerard Cool (Svisujo), Carl Gustafsson (Svedujo). — Antonio Marchioretto (Italujo) kaj Märtha Andreasson (Svedujo) transdonis oficialajn salut-

ojn de la respektivaj landaj asocioj. Bruno Gahler transdonis saluton de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno (IEMW).

La prezidanto de N.E.L. laŭtlegis salutleteron de la plej norda klubo en la mondo, «La espero», en Alta. Sekvis salutoj de la kluboj: Hauge-sund per Olav Thormodsen, Odda per Trygve Reisæter, Oslo per Pepita de Caspary, Skien per Kåre Jensen, kaj Tromsø per Herolv Olsen.

2. *Elekto de kunvenaj funkciuloj:* Protokolantoj: Kirsten Ek kaj Inger Richard  
Kunvenprezidanto: Kjell Gustavsen  
Komisiono por plenrajtoj kaj voĉ-nombrado: Kari Kalsås kaj Aslaug Refsing.

La menciita komisiono poste prezentis la liston, kiu montras la divid-or de la voĉoj:

ALTA: Julie Romsdal	8 *	
BERGEN:		
Olav Thormodsen	10	10
Kjell Stokland	9 *	
GJØVIK:		
C. Støp-Bowitz	5	5
HAUGESUND:		
Olav Thormodsen	25	25
Kjell Stokland	24 *	
JØRPELAND:		
Olav Thormodsen	6	6

ODDA :			3. Jarraportoj 1973 kaj 1974 estis prezentataj de la prezidanto kun du aldonoj: 1) Rolf Bugge-Paulsen elektigis honora prezidanto de N.E.L. — 2) Aperis nova libro de Johan Hammond Rosbach «Verda Robo», kaj unu korekto en la listo de kluboj. La raportoj estis aprobatataj.
Trygve Reisæter	5	5	
OSLO :			4. Jarkalkuloj 1973 kaj 1974 estis laŭtlegetataj de John Berggreen. Ambaŭ estis post kelkaj demandoj aprobatataj.
John Berggreen	6		Post la prezentado de la laboro farita dum la du lastaj jaroj, ni starante aŭskultis la nomojn de bonaj kunlaborantoj, kiuj forlasis nin post la lasta landa kongreso. La prezidanto legis la nomojn:
Else Bugge-Paulsen	6		Johanne Bjørgum, Trondhejmo
Rolf Bugge-Paulsen	6		Trygve Davanger, Bergen
Herbert de Caspary	6		Emmy Henriksen, Oslo
Pepita de Caspary	6		Reidar Richard, Oslo
Stella de Caspary	1		Margit Støren, Nøtterøy
Tor de Caspary	1		Emil Andreassen, Tistedal
Harda Danielsen	6		Mimmi Jørgensen, Oslo
Kirsten Ek	6		Arne Gram, Haugesund
Randolf Grotmål	6		Leif Nyborg, Stavern
Kjell Gustavsen	6		Karen Kluge, Stavanger
Aase Gustavsen	6		Helga Øvrum, Skien
Kari Kalsås	6		Egil Hunstad, Bodø
Margrete Landmark	6		Gunvor Normann, Bodø
Otto Prytz	6	129	John Nilsen, Mandal
Aslaug Refsing	6		Sonja Jørgensen, Trondhejmo
Olav Reiersøl	6		Rudolf Johansen, Trondhejmo
Inger Richard	6		Ella Krell, Trondhejmo
Marcella Rieffling	6		
C. Støp-Bowitz	7		5. Alvenintaj proponoj:
Eva Støp-Bowitz	6		1) La estraro ensendis proponon pri altigo de la kotizoj. La proponon oni aprobis sen diskuto: Klubanoj ordinaraĵ pagos 30 kr., klubanoj familiaĵ: 15 kr., klubanoj junulaj 15 kr., junaj familiaĵ 5 kr. (neŝanĝita). — Rektaj
Harald Støp-Bowitz	6		
Brynhild Østmo	6	129	
SARPSBORG :			
C. Støp-Bowitz	18	18	
SAUDA :			
Olav Thormodsen	19	19	
SKIEN :			
Kaare Jensen	12	12	
TROMSØ :			
Lars Bårdsen	2		
Johan Eilertsen	2		
Rolf Holm	2		
Herolv Olsen	2		
Olav Olsen	2	10	
Rektaj membroj: Saxer Ebeltoft	1	240	

\*) ne alvenis.

membroj ordinaraĵ: 35 kr., rektaj membroj fam.: 15 kr., rekt. membroj junulaj: 15 kr. Subtenantaj membroj minimume 50 kr. Dumvivaj membroj malpli ol 60-jaraĵ: 20-oblo de klubano ordinara. Dumvivaj membroj pli ol 60-jaraĵ: 10-oblo de klubano ord.	til å utfolde sin særegne kultur. Dette prinsippet er også fastslått i menneskerettighetserklæringen, som Norge har undertegnet. Norsk Esperanto-Forbund ber derfor om at forholdene blir lagt til rette slik at samene kan utvikle sin kultur slik de selv ønsker det.
2) C. Støp-Bowitz ensendis proponon pri ŝanĝo de la limdato por ensendo de proponoj al la landaj kunvenoj. § 16, 2a frazo, ŝanĝiĝu al: «Forslag om dette (dvs. lovendringer) må sendes Forbundsstyret innen 1. mars det år landsmøtet skal holdes, dog minst 2 måneder før landsmøtet.»	Rezolucio 2 Norsk Esperanto-Forbund, samlet til landsmøte i Tromsø i dagene 4. til 7. juli 1975, henstiller til NRK, radio og fjernsyn, å sende opplysningsprogrammer om Esperanto.
Motivigo: Ĉar Norvega Esperantisto nun aperas nur 6-foje jare, kaj kunvoko de la landa kunveno tial ordinara devas aperi en n.ro 2, statutproponoj devas alveni tiom frue, kiom laŭ la supra propono por aperi en la tagordo en la kunvoko. La proponon subtenas la Liga Estraro.	Folk i Norge vet lite om hva dette internasjonale språket og bevegelsen står for, derfor må våre største massemedier gå inn for å spre informasjon om hva Esperanto er, og hva det representerer. I første rekke vil vi foreslå at det lages et par programmer til bruk i skoleradio og skolefjernsyn, slik at elever og lærere kan bli allsidig orientert om Esperanto, som forøvrig er oppført som studieemne i den nye mønsterplanen for grunnskolen. Vi foreslår ett program om språkets tilblivelse, utbredelse og bruksområde, og ett program om selve språket, ordforråd, fonetikk, grammatikk etc. Flere utenlandske radio- og fjernsynsselskaper sender kurs i Esperanto og programmer om og på Esperanto. Vi mener at tiden nå er inne til at også norsk radio og fjernsyn viser interesse for dette emnet og ber om at det snarest blir tatt et initiativ på de områder vi her har nevnt. Norsk Esperanto-Forbund er interessert i samarbeid med NRK om utformingen av programmene.
3) Alvenis propono de Otto Prytz pri rezolucio, oni laŭtleĝis ĝin, kaj ĝi estis tuj aprobatata. Vidu malsupre: rezolucio 1. — Alvenis propono de Elna Matland pri rezolucio al Norsk Rikskringkasting. Post laŭtleĝo kaj mallonga diskuto pri kelkaj detaloj, ĉefe lingvaj, oni lasis al redakcia komisiono (M. Landmark, O. Prytz, O. Thormodsen) prilabori la tekston, kiu estis aprobatata.	6. Esencaj taskoj de landa asocio: prelego de d.ro Werner Bormann,

Rezolucio 1

Norsk Esperanto-Forbund, samlet til landsmøte i Tromsø 4.-7. juli 1975, uttrykker sin solidaritet med samene i deres kamp for likestilling med den øvrige befolkningen. Esperanto-bevegelsen har alltid gått inn for at enhver folkegruppe skal få anledning

vicprezidanto de U.E.A. kaj estrarano pri landaj asocioj. Diskutado. — D.ro Bormann komencis sian longan kaj interesan prelegon per la konstato, ke la esperantistaro, eĉ en la glorplenaj tempoj kiam multaj, famaj esperantistoj estis aktivaj, neniam estis multnombra. Eĉ en la tempo, kiam partoprenis centoj da homoj la kursojn, restis, kiel hodiaŭ, nur eta procento kiel aktivuloj. Por plifortigi la landan asocion estas necese altiri al ĝi novajn membrojn per aranĝo de kursoj. Inter la kursanoj vi trovas la estontajn agantojn kaj uzantojn de la lingvo. Oni devas klare distingi inter *agantoj* kaj *uzantoj*. La uzantoj estas tiuj, kiuj simple lernas la lingvon pli aŭ malpli bone kaj uzas ĝin por personaj celoj (turismo, filatelo, k.t.p.), la agantoj faras la samon, sed krome ili partoprenas aktive la internan organizan laboron aŭ la aktivecojn direktitajn al la ekstera mondo. Ambaŭ kategorioj estas valoraj, kaj oni devas prizorgi, ke ili trovas sian lokon ĉiu laŭ sia bezono en la landa organizo kaj en kluboj aŭ kiel unuopuloj kie ankoraŭ ne ekzistas klubo. Kursanoj, kiuj, pro multaj bonaj kaŭzoj, eble ne havas tempon aktive partopreni en organizita esperantolaboro, oni provu konservi kiel apogantoj kaj simpatiantoj de nia movado. Ili, kune kun la uzantoj estas valoraj, kiam temas pri varbado de kursanoj, ili certe kunhelpus ankaŭ se temas pri iu agado, kiu ne postulas de ili tro longedaŭran laboron. Estas ankaŭ grave akiri simpatiantojn inter homoj, kiuj neniam volas partopreni esperantokurson, sed kiuj komprenas la ideon malantaŭ Esperanto, la signifon de internacia lingvo. Eble inter

tiuj lastaj ni trovas kelkajn, kiuj povus helpi al ni plibonigi nian ekonomion, kiu ofte limigas niajn eblecojn efike labori.

La prelego de d.ro Bormann vekis grandan intereson, kaj estis la bazo de la diskutado, kiu sekvis post la elektoj sub la punkto Eventualajoj.

7. *Elektio de Liga Konsilantaro, inkluzive de Estraro, anstataŭantoj kaj revizoroj.* — La sekretariino Signe Korstvedt kaj la estrarano Olav Rygg ne deziris reelekton, ankaŭ la kasistino ne deziris reelekton, sed konsentis resti dum la venontaj du jaroj, ĉar oni ne sukcesis trovi homon pretan transpreni tiun gravan taskon.

La elekta komitato, elektita jam dum la landa kongreso en Haugesund (Elna Matland, Sauda, Thor Magnus Carlsen, Oslo kaj Per Johan Krogstie, Løten) ne ĉeestis, sed prezentigis per letero de Thor M. Carlsen ilia propono, kiu ankaŭ fariĝis la rezultato de la elekto:

Prezidanto: C. Støp-Bowitz (reel.)  
 Vicprezid.: Kjell Gustavsen (reel.)  
 Ĝen. sekr.: John Berggreen (reel.)  
 Sekretario: Tom Jøran Bauer (nova)  
 Kasisto: Aase Haube Nielsen (reel.)  
 Estrarano: Kirsten Ek (reel.)  
 Estrarano: Otto Prytz (nova)

Anstataŭantoj:

1a: Harda Danielsen (reelekto)  
 2a: Geir Sverre Braut (nova)  
 3a: Rolf Berg (nova)

Konsilantaranoj:

Lars Kåre Hunnes, Trondh. (reel.)  
 Per Johan Krogstie, Løten (reel.)  
 Elna Matland, Sauda (reel.)  
 Herolv Olsen, Tromsø (reel.)  
 Ole J. Rønnevig, Haugesund (reel.)

Revizoroj: Aslaug Refsing (reelekto)

John Selbekk (reelekto)

Elekta Komisiono:

Elna Matland, Sauda

Thor Magnus Carlsen, Oslo

Per Johan Krogstie, Løten

La prezidanto bonvenigis al la laboro en la estraro la novajn membrojn kaj dankis al tiuj, kiuj eliras, pro multjara fidela laboro.

8. *Eventualajoj.* Multaj partoprenis la diskutadon. Temis pri la neceso interesigi homojn, precipe la gejunulojn pri Esperanto. Eble estus utila la ideo kun «malfermita domo»: oni invitas homojn, informas pri Esperanto, eble povus el tiu grupeto fariĝi studrondo. Estis menciite, ke estas grave, ke homoj, kiuj skribas al la oficejo, ricevas informon pri esperantisto en la proksimeco, tiel estus eble al la rektaj membroj fari ion. Oni substrekis la signifon de vizitoj faritaj de eksterlandaj esperantistoj, precipe se ili povus gvidi kurson.

La esenco de la diskutado, aŭ pli bone interparolo, estis, ke estas necese, ke ĉiu unuopa membro aktive laboru, ĉiu laŭ sia povo, kaj ke la kontakto inter la estraro de la landa asocio kaj la kluboj kaj unuopaj membroj devas esti bona. *Kaj portu la verdan stelon, ĝi donas al ni ofte la unuan kontakton kun neesperantisto. Ne estu fanatikulo, sed prezentu trankvile viajn argumentojn kaj viajn bonajn spertojn.*

La prezidanto C. Støp-Bowitz fermis la 44an Landan Kongreson dankante al Kjell Gustavsen pro bona gvidado de la kunvenoj, kaj la aranĝantojn, kiuj faris grandegan laboron, kaj kiuj sukcesis krei tre memorind-

an kongreson en tre amika etoso. Specialan dankon meritas la multaj eksterlandanoj, kiuj malgraŭ la malvarma kaj parte malbona vetero ĉiam estis bonhumoraj.

Kirsten Ek Inger Richard

## JUBILEOJ

### Jens Schjerve 90-jara

La 7an de septembro Jens Schjerve fariĝos 90-jara! Kiu — el pli novaj esperantistoj — ne memoras lian senlacigeblan bonhumoron dum li prelegis aŭ gvidis kurson! Li fariĝis esperantisto jam en 1923, kaj gvidis sennombrajn kursojn en Norvegujo kaj eksterlando, kaj estis unu el la plej kapablaj instruistoj laŭ la Cseh-metodo.

### Andreo Cseh 80-jara

La 12an de septembro Cseh — la patro de la Cseh-kursoj kaj kreanto de la Universala Ligo — fariĝos 80-jara. Pro siaj du grandaj kursoj en 1930 en la Universitato de Oslo, per kiu li fakte restarigis la esperantomovadon en nia lando, li havis plej grandan signifon al ni.

### Oluf Olsen 85-jara

La 14an de septembro la multjara presisto kaj ekspedanto de Norvega Esperantisto, Oluf Olsen, fariĝos 85-jara. Li naskiĝis en Danlando, esperantistiĝis en 1907 kaj fariĝis norvego en 1911.

Al la jubileuloj nian plej koran gratulon.

# Ĉu vi tradukas?

Noen turister drar i en båt inn i en grotte. De har tenkt å lete etter rester av en ubåt, som skal ha trengt inn i grotten. De har med seg dykkerdrakt og masker. En av dem stuper fra båten ut i det kalde vannet. Men selv med sterke lamper er det umulig å se noe under vannet.

Prøv først selv å oversette disse setningene. Så skal vi diskutere dem. Det er ingen spesielle vanskeligheter her, men det er alltid noe å lære når man oversetter.

## 1. setning:

Ordet «noen» har to betydninger: 1) to-tre-fire stykker, 2) en eller annen. Her er det ingen tvil — det skal være *kelkaj*. I betydning 2 heter det *iu*, et ord som på Esperanto også kan brukes i flertall. Tenk over dette, så skulle forskjellen på *kelkaj* og *iuj* umiddelbart være klar. Å «dra» brukes her i en nokså spesiell betydning. Det sier seg selv at en ikke kan oversette med *tiri*. Esperanto har et utmerket ord som heter *veturi*, som dekker både «kjøre», «scile» («kjøre med båt», som det heter flere steder) og «dra».

*Kelkaj turistoj veturas per boato en groton.*

## 2. setning:

«Tenke» heter vanligvis *pensi*. *Pensi* har to betydninger: 1) å danne seg ideer, utvikle ideer, 2) mene. Eksempler: 1) *Mi pensas, do mi ekzistas.*

2) *Kion vi pensas pri miaj planoj?* Tydeligvis passer dette verbet ikke. Vi velger *intenci*, som betyr «ha til hensikt», «akte». — Mange nøler med å bruke ordet *restaĵo* i betydningen «rest», ut fra det resonnement at *resti* betyr «forbli» eller «oppholde seg». Men saken er den at *resti* også betyr «være igjen når en eller flere deler er borte» — altså er *restaĵo* akkurat det ordet vi skal ha. — En «ubåt» er ingen båt, men et skip, samme hva de forskjellige nasjonalspråk kaller den: *submara ŝipo*. — «Lete etter» er det samme som «søke» — ingen preposisjon! — «skal ha trengt inn» er et idiomatisk norsk uttrykk, dvs. et uttrykk som er særegent og som ikke kan oversettes ord for ord. Hva er betydningen av dette uttrykket? Jo, «etter sigende», og det har man et godt ord for på Esperanto, nemlig *laŭdire*. Endelig har vi ordet «trenge». Vi har tidligere vært inne på dette ordet i betydningen «behøve» (*bezoni*). Det er selvsagt ikke den betydningen her. *Penetri* hører vel ikke til nybegynnerens ordforråd; det betyr «trenge inn (i), trenge gjennom». Vær samtidig klar over at man også kan trenge vekk, trenge seg fram, altså «trenge» brukt transitivt — da vil vi foreslå *premi* eller *sovi*. Men det vi trenger, er altså *penetri*.

*Ili intencas serĉi restaĵojn de submara ŝipo, kiu laŭdire penetris en la groton.*

Før vi slipper setning nr. 2, må vi svare på en innvending som sikkert vil melde seg. Det står «har tenkt» (altså perfektum), men det er brukt *intencas* (altså presens) i oversettelsen. Ja, ganske riktig: har man tenkt

å gjøre noe, da har man (fortsett) til hensikt å gjøre det!

## 3. setning:

«Ha med seg» kan ofte godt gjengis med *kunporti*, vel å merke hvis man har med seg noe man kan bære. Har man f.eks. med seg sin kone, bør man velge et annet ord! — «Å dykke» heter *skafandri* når man benytter dykkerdrakt, *skafandro* (det er altså et ord man f.eks. ikke kan bruke om svømmefugler!) «Maske» heter *masko* både når det gjelder julenissemaske, dykkermaske, kirurgmaske, karnevalsmaske, dødsmaske og når det gjelder «å bevare masken», men vær klar over at det heter *maso* når det gjelder f.eks. strikking!

*Ili kunportis (eller kunportas) skafandron kaj maskojn.*

## 4. setning:

«En av dem»: man har valget mellom *unu* og *iu*. Velg det ordet som passer best til tanken. Normalt vil *iu* være det som brukes, men også *Zamenhof* har brukt *unu* der hvor det ikke egentlig skal presiseres at det dreier seg om entall. — Det kan ikke ofte nok understrekes at man skal bruke preposisjonen *el* når det dreier seg om et antall «av». — «Stupe» i den spesielle betydning man har i svømmesport (og i flyvning) heter *plonĝi*. Ellers kan selvsagt *salti* godt brukes. — Når man stuper «fra» en båt, stuper man også «ut av» båten, altså er *el* riktig preposisjon her også. Dermed har vi nevnt to av bruksrådene for denne preposisjonen. Prøv å finne andre!

*Unu el ili plonĝas el la boato en la malvarman akvon.*

## 5. setning:

«Selv» betegner ikke her identitet, heter altså ikke *mem*. Her er «selv» det samme som «endog», «til og med», heter altså *eĉ*. Vi har tidligere vært inne på forskjellen mellom *per* og *kun*, begge med betydningen «med». Vi var enige om at *per* betegner «ved hjelp av». Når man vet dette, skal man være forsiktig og ikke begå en unødvendig feil i vår setning. «Med» sterke lamper er jo nesten det samme som «ved hjelp av», men legg merke til at det jo ikke er med lampene man ser! Oni vidas *per* la okuloj. Betegner da «med» i dette tilfellet «sammen med»? Nei, det betegner virkelig «ved hjelp av». Vi bruker «helpe de» — «Det» er umulig... «det» representerer, som såkalt foreløpig subjekt, «å se», for det er jo å se som er umulig. I slike tilfeller sløyfes «det» på Esperanto. — «Under vannet» er naturligvis tveetydig, men det pleier oftest å bety «under overflaten av vannet», altså egentlig «i vannet», men også på Esperanto heter det «sub la akvo».

*Sed eĉ helpe de fortaĵ lampoj estas neeble vidi ion sub la akvo.*

AK III

## Forpasis Ragna Johannesen

Aktiva kaj fidela anino de La Norda Stelo dum pli ol kvardek jaroj — Ragna Johannesen — mortis en Hamar la 24an de Julio. Neniam ni ŝin forgesos.

EK

## Recenzoj

Holzhaus, Adolf: Granda Galerio Zamenhofa. — Eldonis: Fondumo Esperanto, Helsinki, 1973. 526 grandaj paĝoj. Prezo: kr. 180,00, bindita.

La verko estas albumo de 952 bildoj, parte fotografaj de Zamenhof en ĉiuj eblaj pozicioj, de lokoj, kiujn Zamenhof iam vizitis (je kelkaj oni tamen malfacila vidas la rilaton al Zamenhof aŭ al lia familio), parte temas pri reproduktaĵoj de dokumentoj, kaj se tiuj estas ekz. en la rusa lingvo, troviĝas esperanta traduko. Oni devas admiri la kolektokapablon de la aŭtoro. Interesiĝanto pri la vivo de Zamenhof kaj pri la unua tempo de nia movado sendube trovas en la albumo riĉan materialon, eĉ se li devos kribri. Aliflanke oni havas la impreson, ke la aŭtoro senkritike reproduktis ĉion, kion li sukcesis kolekti. Kribrado de la materialo *antaŭ* la publikigo sendube estus avantaĝo. Kian rilaton al Zamenhof havas ekz. bildo «Adolf Holzhaus kun blanka urso 1958»?

C.S.B.

### Libroj unuope ricevataj.

Ek! Självinstruerande lärobok i Esperanto. Esperantoförlaget, Malmö. Sveda eldono de H. Behrmann: Esperanto programita.

Uhlenspieghel, t. e. Strigspegulo. — Wouter Pilger: Ne ĉiam (poemaĵoj), kaj Amoro kaj amo (el la ampozio de P. C. Hooft). Eldonis Vulpo-libroj, Amsterdamo.

Medicina Heroldo. Organo de Brazila Esperantista Kuracista Rondo, n.ro 1.

Heinrich Färber: La ergokrata evangelio. Eldonis: Matthias Kraintschan, Wien. Prezo: 24 aŭstr. ŝilingoj.

### Muziknotoj por Cent Himnoj

En la jaroj post kiam «Cent Himnoj tradukitaj de Hans Amund Rosbach» aperis, multaj esprimis la deziron havi ankaŭ la muzikon al tiuj himnoj. Nun fine la muziko eldoniĝis en kajero A4-formata, sufiĉe simpla, sed kun klare legeblaj muziknotoj, al kiuj estas donataj la vortoj de la unua strofo, por indiki bli bone la kantmanieron de ĉiu opa himno.

La kajero havas 24 paĝojn.

## Donacoj

Poŝtmarkojn donacis al Norvega Esperantisto Harda Danielsen, C. Støp-Bowitz, Tamiko Kauakami-Nielsen, Oslo, Lise Koller, Hamar, Saxer J. Ebeltoft, Arendal, Jean Amouroux, Perpignan. — Ni kore dankas pro la donacoj, kaj aparte mencias, ke la donaco de f-ino Danielsen estas tre valora.

Ni daŭre akceptas poŝtm. Adreso: Hulderveien 17 B, 1700 Sarpsborg.

## Korespondu!

Mia deziro estas korespondi kun norvegoj de samaj intereso, la loĝejproblemoj kaj iliaj kaŭzoj. Arild Sjelle, Adelgade 83, DK-4880 NYSTED, Danlando.

## Informoj de la Ekzamena Komisiono

Ordinaraj aŭtunaj ekzamenoj. — Ekzameno okazos ĉirkaŭ la 1-a de Decembro 1975. Instruistajn ekzamenojn oni povos fari en Oslo, superan kaj elementajn ekzamenojn en Oslo, Bergen, Haugesund, Sarpsborg, Suda kaj Trondhejmo (la ekzamena komitato en Tromsø provizore ne funkcias). Oni anoncu sin per la skemoj riceveblaj de la lokaj ekzamenaj komitatoj aŭ rekte de la Ekzamena Komisiono. Oni sendu la skemojn al tiu komitato, ĉe kiu oni intencas fari la ekzamenon, *antaŭ la 1a de Novembro*. Personoj, kiuj faros ekzamenon ne en Oslo, plenigu po 2 — du — skemojn. *Plenigu la skemojn precize kaj komplete!* — *Aliĝoj, kiuj alvenos post la 1-a de Novembro, ne estos konsiderataj.*

Jenaj helpiloj por sinpreparado al

ekzamenoj estas aĉeteblaj ĉe la Ekzamena Komisiono, Boks 942, Oslo 1, poŝtĝirokonto 1.00.34.

*Ekzercaj taskaroj:* Kajero I: traduktaskoj por elementa ekzameno. Kajero II: diktaĵoj por elementa ekzameno. Kajero III: traduktaskoj por supera ekzameno kaj taskoj por instruista ekzameno. — Prezo por unu kajero: kr. 1,00 + afranko.

*Vortlisto* por Adi: La Forto de l' Vero, kr. 0,50 + afranko.

*Ekzamena Regularo* kun ekzamenaj programoj kaj konsiloj pri lernolibroj kaj literaturo, kr. 0,50 + afranko.

Notu ke ĉi tiujn helpilojn oni aĉetas ĉe la Ekzamena Komisiono.

EKZAMENA KOMISIONO DE N.E.L.

C. Støp-Bowitz, prez.

## Kristanoj kongresas

Kristana Esperantista Ligo Internacia en tiu ĉi jaro havis sian kongreson — kiel kutime la semajnon antaŭ la UK — en Jönköping en suda Svedujo. La ĉ. 100 kongresanoj kunvenis en Södra Vätterbygdens Folkhögskola, kiu donis la tre plaĉan kadron al la plensukcesa kongreso. Tamen la kongreso ankaŭ havis alian kadron: La kongresa temo: «Kunhomo en mondo de kontrastoj», la programo kun prelegotemoj kaj diskutotemoj, ĉio estis elpensita kaj iniciatita de la juna pastoro Ingalill Drobny — kiu entombiĝis la tagon antaŭ la komenco de la kongreso.

KELI estas ekumena movado, kaj tio esprimiĝis plurfacete. En la dimanĉa antaŭtagmezo la kongresanoj partoprenis la diservon de loka preĝejo apartenanta al la Sveda Eklezio. La parofestro faris la liturgian parton kune kun la prezidanto de KELI, pastro Burkhard el Germanujo, kiu predikis — lerte tradukita de Åke Ahlrén. Jam marde la preĝeja vizito estis al la loka katolika kongregacio, kie la pastro kaj la estro de la kongregacia konsilantaro bonvenigis kaj regalis la kongresanojn, kaj merkrede oni vizitis vesperan kunvenon de la tielnomita «Jesuopolo», t.e. la nuntempa junularmovado kiu kreskas trans ĉiuj malnovaj limoj de konfes-

oj. Oni ankaŭ ne forgesu la propran diservon kun la sankta manĝo, ĉe kiu 5 pastoroj kunagis: Lutheraj sveda, germana kaj norvega, reformita nederlanda kaj presbiteriana angla, kaj ĉe kiu partoprenis — ligitaj per la Sankta Spirito — la kongresanoj el ĉiuj konfesoj.

La etoso de la kongreso estis — kiel decas ĉe kristana kunveno — harmonia kaj ama, plenplena de kantado, i. a. de la ĥoro, kiu kvarvoĉe kantis jam dum la dimanĉa diservo. Pastoro Burkhard rifuzis reelekton, kaj la prezidanteco transiris al Anglujo: Nova prez. estas Reginald C. W. Bedford, 49 Margarets Way, Appleby, Cumbria CA 16 6 SA.

Ankaŭ materie la kongreso povis esti fruktedona: La Agado E-3, la esperanto-misia sociala laboro por redoni al blinduloj en okcidenta Afriko la vidkapablon, ricevis pere de tiu ĉi kongreso sufiĉe aliajn monsumojn.

## UEA-financoj kaj ni

Post nia lastjara kongreso en Hamburgo estis neniu sekreto ke la financa situacio de UEA fariĝis tre malfacila. Tio estis bedaŭrinda konstato. Tio tamen ne estas iu specialaĵo de la Esperanto-movado. Verŝajne ĉiaj organizaĵoj en nia mondo nuntempe trovas ke elspezoj kreskas multe pli rapide ol enspezoj, kaj UEA ne estas la unua organizaĵo kiu devis alvoki siajn membrojn pri rapida helpo.

La ĉefartikolo en la lasta numero de Norvega Esperantisto portis al ni norvegaj esperantistoj la alvokon de

UEA. Ni rajtas antaŭvidi ke tiu alvoko ne estis vana. Per volonta monkontribuado kiel subtenantaj membroj, kiel donacantoj al kontorfondaĵo, propaganda fondaĵo, Kampanjo Reisæter kaj multaj aliaj financaj klopodoj samideanoj en nia lando jam ofte pruvis sian pretecon oferi kiam oferado estas necesa.

Neniu kutimas demandi kiom donis la aliaj. Ni bone scias ke kio por unu estas granda fortostreĉo, por alia estas iom malpli granda fortostreĉo. Por multaj el ni jam la nova jarkotizo por esti membroabonanto de UEA sentiĝas malagrabla alta. Aliaj espereble trovas ke kiam UEA nun treege bezonas monan helpon, ili povas kontribui iom aldone al tiu jarkotizo. Estas pluraj eblecoj por tio, kiel jam diris la lastnumera ĉefartikolo.

Unu nova ebleco troviĝas. En la februara numero de Revuo Esperanto nia prezidanto Humphrey Tonkin anoncis kreigon de nova membrokategorio: Societo Zamenhof. Membro en Societo Zamenhof pagas jarkotizon kiu estas minimume la trioblo de la MA-kotizo, do minimume 300 norvegajn kronojn. Membro de Societo Zamenhof ricevas la Revuon Esperanto kaj la jarlibron ĝuste kiel MA-membro; sed krome li ricevos «de tempo al tempo» rekte de la prezidanto de UEA informojn pri ĝia stato — informojn pli detalajn kaj pli ĝisdatajn ol tiuj kiuj normale aperas en la Esperanto-gazetaro. En ĉiu Universala Kongreso de Esperanto okazos speciala akcepto por membroj de Societo Zamenhof.

Oni ne pensu ke membriĝo en tiu

Societo devigas por la vivo. Aliĝinte por unu jaro vi mem la postan jaron decidus ĉu vi volas renovigi la membrecon aŭ preferas ekzemple reiri al la MA-kategorio. Se vi jam pagis jarkotizon kiel MA por la nuna jaro, aŭ se vi estas dumviva membro de UEA, vi povas fariĝi Societano por 1 jaro per pago de 200 kronoj.

Tio do estas ankoraŭ unu maniero helpi la financojn de nia mondorganizaĵo. Se vi trovis ke ĝuste vi estas en tia situacio ke vi povas aliĝi al la Societo, ne hezitu realigi la decidon, ĉar la mencio en Revuo Esperanto pri via aliĝo povus instigi aliajn fari la samon.

Aliĝojn akceptas la Norvega ĉefdelegito, Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 A, Oslo 6, poŝtĝiro 1.33.29.

Ludvig Anjer

## Norvega Kronika

### MARA VENTO, Haugesund

En jarkunveno 27/2 «Mara Vento» reelektis la estraron konsistantan el O. Thormodsen, prez., Johs. Sortland, vicprez., Kjell Stokland, sek., Steffen Kjetland, kasisto, Hendry Hermansen, estrarano. Anstataŭantoj: Kristine Lie, Ole J. Rønnevig. Revizoroj: Erling Vorland, Lovise Sortland. — Studgvidantino: Jarmila Ŝestakova. Propagand- kaj inform-komitato: Arne Alne, Georg Olsen, Sigmund Blikshavn. Komisiulo por la eldonejo: Steffen Kjetland. Arkivistino: Ester Handeland.

Aprobiĝis la jarraporto kaj la jarbilanco. La klubo dum la jaro pasinta disvolvis relative viglan agadon. Nombro da membroj partoprenis la distriktan jarkunvenon en Lofthus, multnombre la «Mara Vento»-anoj veturis al la Esperanto-renkonto sur la Haukelimonto kaj relative granda aro kongresis en Hamburgo, kien oni vojaĝis grupe.

O. Thormodsen

### KLUBO ESPERANTISTA EN OSLO

21/4. La prez. bonvenigis, speciale novan anon. C. Støp-Bowitz informis pri ebleco por elsendado en Esperanto el la Vatikana Radio. 'La Vagabondo' estis verkita kaj prezentiĝis de Pepita de Caspary. Ĝi temis pri la libro «Esperanto en perspektivo», pri artikolo «Kiel apliki Esperanton» kiu aperis en «Rogalands Avis», pri artikolo, skribita de Pepita de Caspary, kiu aperis en «Programbladet» kaj fine «La Vagabondo» enhavis multajn amuzajn spritaĵojn. Rilate al la artikolo en «Programbladet» ŝi admonis, ke oni multnombre skribu al «Programbladet». John Berggreen gratulis al Pepita de Caspary pri ĉi tiu artikolo kaj prezentis 10minutan lingvan instruadon per kiu li atentigis pri eraroj kiujn oni ofte povus fari pri akuzativoj, la korelativaj vortoj kaj la elparolo, kaj li preparolis la jam-boreon, kiu okazos en Lillehammer ĉi-jare, kiu donos eblecojn por propagandi por Esperanto. Stefan Murak preparolis «Folkebevegelsen Framtiden i våre hender» kaj ke ekzistas ebleco por aperi rubrikon pri Esperanto en «Ny livsstil» — la gazeto de ĉi tiu organizaĵo. Klubo Esperantista en Oslo dum ĉiuj kunvenoj ar-



anĝas lotumadon, kaj la rezultanta sumo dum ĉi tiu kunveno iros al «Fondaĵo Canuto» de U.E.A. Konsiderante la nombron da partoprenantoj la rezulto, 180 kr., estis bonega. Certe bona ideo ankaŭ por la aliaj kluboj por tiamaniere plibonigi la ekonomion de U.E.A.

Vendiĝis libroj por 118,25 kr.

Raportis O. K.

14/5. Kirsten Ek bonvenigis kaj donis la parolon al C. Støp-Bowitz, kiu parolis pri Didoj aŭ Drontoj, kaj eĉ aliaj neflugpovaj birdoj, kiuj estas en danĝero por ekstermiĝi. En la sama danĝero estas ankaŭ kelkaj aliaj bestoj. Kelkaj lumbildoj estis montrataj dum la parolado. Vere interesa. Granda aplaŭdo sekvis. Th. M. Carlsen dankis pro la parolado.

Th. M. Carlsen menciis artikolon en «Semajna ĵurnalo» pri Esperanto. — J. Berggreen menciis ke aperis 5 artikoloj en la gazeto «Aftenposten» dum la lastaj du semajnoj. Th. M. Carlsen fermis la oficialan parton de la kunveno, kaj poste estis kafopaŭzo kun la ordinara babilado.

Libroj vendiĝis por kr. 119,10.

Raportis K. G.

26/5. Post bonvenigo de la vicprez. oni unue diskutis la tagordon de la landa kunveno en Tromsø — C. Støp-Bowitz aldonis kelkajn informojn — kaj poste la jar- kaj kalkulraportojn de NEL. — La gazetaran servon Th. M. Carlsen speciale priparolis.

Gravan rezolucipropon, faritan de Elna Matland, kun admono al N.R.K. ke ĝi aperigu informojn pri Esperanto, oni diskutis, kaj ankaŭ ideojn de ŝi pri statutŝanĝoj.

Kjell Gustavsen ĵus travivis sian 60-jaran naskiĝtagon, kaj okaze de tio C. Støp-Bowitz transdonacis al li libron.

Vendiĝis libroj por kr. 61,40.

Raportis O. K.



NORSK ESPERANTO-FORBUND  
(*Norvega Esperantista Ligo*)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100 30  
Kontoradresse: General Birchs gate 30, Oslo  
Telefon: 69 14 39

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

*Turisma Servo:*

Boks 942, Oslo. Postgiro 100 32

ESPERANTOFORLAGET A/S  
(*Eldonejo Esperanto A/S*)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100 31  
Kontoradresse: General Birchs gate 30, Oslo  
Telefon: 69 14 39

*Ĉefdelegito de U.E.A.:*

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,  
Oslo 6. Postgiro 1 33 29

*La redakcio:*

Hans Amund Rosbach, Nergt. 37 c,  
6500 Kristiansund N. Telefon: 776 20

*Ekspedejo de Norvega Esperantisto:*

Boks 942, Oslo 1

Trykt i HAAVES BOKTRYKKERI, Brumunddal